



# Eventoj

Redakcia adreso:  
Budapest, pk. 87.  
H-1675, Hungario  
Telefono kaj telefakso:  
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado *novembro (1) - '92*



Internacia Komitato  
por Etnaj Liberecoj

## Rezolucio

La subskribintaj etnistoj

### rimarkas

- ke Hispana Esperanto-Federacio uzas en esperanto-tekstoj la kastili-lingvan nomon "Valencia" por aludi al la urbo, kiu venontjare gastigos la Universalan Kongreson de Universala Esperanto-Asocio (UK);

- ke Universala Esperanto-Asocio (UEA) ankoraŭ nenie atentigis la kongresontojn, ke València estas ĉefurbo de regiono, kiu posedas historion, lingvon kaj kulturon konsiderinde malsimilajn al tiuj de la plimulto en la Hispana Ŝtato, kaj aparte proksimajn de tiuj de Princlando Katalunio kaj Balearaj Insuloj;

### timas

- ke la UK estos uzita por pluigi mistifikojn pri unueco de iaj hispanaj nacio kaj kulturo inter la kongresanoj;

- ke la UK povus esti uzata de politika partio por diversaspekte trompi la kongresanojn;

### pro kio ni petas

- ke la loknomoj uzataj en la diversaj informiloj kaj revuoj estu originalaj kaj oficialaj, nome València, Alacant, Castelló, Elx, Segorbe k.s.; okaze de esperantigo de loknomo; ĝi estu el la originala, nome Alakanto k.s.;

- ke la personaj nomoj de aŭtoritatoj estu tiuj, kiujn ili uzas, sen tradukoj al aliaj lingvoj, nome la Prezidanto de la "Generalitat" estas Joan Lerma;

- ke en la planado pri la prezentado de urbo València kaj ĝia lando, i.a. ankaŭ en la t.n. nacia vespero, partoprenu prestiĝaj lokaj kulturaj asocioj, kaj unualoke Acció Cultural del País Valencià;

- ke UEA informu la esperantistaron en siaj kongresaj informiloj kaj libro pri la historio, kulturo kaj lingvo de Valencio kaj ĝia regiono, Valencilando;

- ke, se oni antaŭvidas frazaron, por ke la kongresontoj povu surstrate peti informojn, ke ĝi estu esperanta-valencia;

- ke la Loka Kongresa Komitato antaŭvidu peti al elstaraj valenciaj kulturagantoj, kiaj la poeto Vicent Andrés Estellés, la verkisto Enric Valor, la kantisto Raimon k.a., membriĝi en la honoran komitaton de la UK, tiel ke ĝin konsistigu ĉefe valencianoj.

En Sabadell, la 3-an de oktobro 1992.

60 individuaj subskriboj,  
inter ili multaj estraranoj de Kataluna Esperanto-Asocio kaj Kataluna Esperanto-Junularo



Germana  
Esperanto-Asocio

Membroasocio de la Germana Konsilio de la Eŭropa Movado

Deutscher  
Esperanto-Bund e.V.

Estimataj gesamideanoj,

kun abomeno kaj hororo ni vidas, ke dum la lastaj monatoj okazis pli kaj pli ofte atakoj kontraŭ eksterlandanoj en nia lando. Esperantistoj ne povas toleri tion!

Pro tio la estraro de GEA per rezolucio apelacii al la membroj kaj al ĉiuj Esperanto-amikoj, ke ili kun ankoraŭ pli da civila kuraĝo ol ĝis nun aktivu por la protekto de alilandaj homoj en Germanio.

La rezolucion ni sendis - germanlingve - al multaj ĵurnaloj, revuoj, radio- kaj televidstacioj, politikaj partioj ktp. en Germanio. Mi aldonas la esperantlingvan tekston de la rezolucio.

Kun samideanaj salutoj

d-ro Wolfgang Schwanzner, prezidanto de GEA

## Rezolucio de Germana Esperanto-Asocio

okaze de la kontraŭeksterlandanaj atakoj dum la lastaj monatoj en Germanio

Germana Esperanto-Asocio, kiel reprezentanto de civitana kaj kultura movado aktivanta de pli ol 100 jaroj por kompreno kaj paco inter homoj de malsamaj naciecoj, eksterordinare indignas pri la aktuala ondo de perforto kontraŭ eksterlandanoj en Germanio. Kun abomeno kaj hororo ni vidas, ke ŝovinismo kaj rasismo en blinde furioza malamo disvastiĝas pli kaj pli en Germanio-kaj danĝerigas nian demokration. Kiu hodiaŭ silente rigardas, kiam oni batas fremdulojn, morgaŭ devos rigardi, kiel oni bruligas librojn kaj kiel postmorgaŭ oni murdos tutajn grupojn el la popolo. La pretendo, ke Germanio "ne estas lando malamika al eksterlandanoj", fariĝas nuda ciniko.

### Germana Esperanto-Asocio tial postulas:

- efikan protekton kontraŭ atakoj al korpo kaj vivo de homoj, kaj energian agadon de polico kaj justico kontraŭ la obstinaj perfortuloj;
- ampleksan dialogon inter socio kaj politiko sur ĉiuj niveloj, por venki la estiĝintan fremdiĝon kaj por serĉi eventualajn solvojn por la realaj problemoj kun konsidero de ties kaŭzoj;
- solidaran kaj aktivan pledon de ĉiuj demokratoj en "reto de solidareco" kontraŭ la terorismo de la politikaj dekstruloj, per tio ke pli ol ĝis nun ni faru la valorojn de demokratio, libero kaj homaj rajtoj, bazo de nia identigo kun nia respubliko, tiamaniere malfortigante la naciisman elementon. Kiu nomas sin germano, devas aktive pledi por tiuj valoroj, pri kiuj ni devus fieri de 40 jaroj. Ĉiu, kiu tiel piedpremas niajn valorojn, metas sin kontraŭ nia socio kaj devas porti la konsekvencojn antaŭvideblajn en konstitucie jura ŝtato.

Al niaj samlandanoj kaj al niaj amikoj en la tuta mondo ni diras: Tion ĉi ni ne toleras! Ne eblas senkulpiĝi tiajn fiagojn. Ni apelacias al niaj membroj kaj al ĉiuj esperanto-amikoj, ke ili kun ankoraŭ pli da civila kuraĝo ol ĝis nun aktivu por la protekto de homoj senkulpe minacataj.

En Mainz, la 4-an de oktobro 1992.

la estraro de Germana Esperanto-Asocio

## Organizaj demandoj

### Rakonto pri sensukcesa provo **UEA KAPABLAS, SED NE VOLAS!**

En la antaŭaj du numeroj aperis artikoloj de J. Werdin, pri la mankoj de nuna funkciado, strukturo de UEA - kun liaj proponoj. Kvar-kam plurajn punktojn de tiuj artikoloj - ĉefe la priifinancajn - ni taksas nereaj, ni opinias, ke oni tamen devas paroli pri ili, ja tiaj pensoj aperas ĉe multaj esperantistoj. Kaj eĉ ĉe la nuna financa bazo estas multaj eblecoj... Kompreneble oni devas konsideri la prioritatojn... La red.

### Nura urĝo: ne forgesi la reklamon.

Pri la internacia komunikado interesiĝas pli multe ekstere de nia movado, ol interne. La movadanoj ŝatas sian lingvon, sed ne evoluemas timante novajn devigojn. Ili esperas favorajn leĝojn de la politikistoj, de UNESKO aŭ de UN, sen pensi ke restos al ni nepre la taskoj de informado, trejnado de instruuloj kaj funkciigo de servoj.

Anstataŭ esti konstanta forumo kun pleno da ideoj por modernigi la propagandon impulse al UEA, la Komitato estas iu mola kapjesa ĉambro. La landaj asocioj (L.A.) ofte delegas tien instigomankajn homojn. La vorto *propagando* malofte aperas en la diskutoj... La konto "propagando" utilas por ŝtopi defecitojn. La buĝetaj paragrafoj preskaŭ ĉiam finiĝas per aprobo al la CO-decidoj (CO = Centra Oficejo de UEA). Ĉu honti pri la de-ni-proponitaj reprezentantoj?

Inter UK-oj la komitatanoj ne renkontiĝas por prepari sian oficon, kaj la estraranoj kunsidas nur unufoje! Pri la cetero zorgas la CO!

### La utilaj jaroj

Ene de la estraro mi respondecis tri jarojn pri la landa agado. De la antaŭulo mankis ĉiaj spuroj. Unu jaro estis necesa por kontakti ĉiujn LA, la dua jaro utilis por studi kun ili urĝojn, eblojn, preferojn. La tria jaro ebligis kompilon de propaganda laborplano, kun detaloj pri preparo, komparo, realigo. Jam ni atingis la balotjaron, kaj iu flustris: "Pro rezigno de l' prezidanto, ni ŝanĝu la tutan estraron!" Ha!

Mi sukcesis kunsidigi en Varsovio, Roterdamo, kaj Brajtono preskaŭ 40 oficialulojn de la LA, kio okazis nek antaŭe, nek poste. Ili ricevis en Brajtono la projekton por plurnacia reklamkampanjo (la ĉefa manko signita de multaj landoj). Sed la balaa ondo atakis min. Ni emfazis, ke el tiu tria jaro, kun amaso de rilatoj kun pli ol 50 asocioj, subite restis nenio.

### Alia organizo ne eltenus...

La supraj venenoj mortigus iun ajn komercaĵojn. Unue, neniu entrepreno ŝanĝas bloke la plenan de gvidantoj, por riski la fido-perdon de klientoj kaj laboristoj, kaj due, senpripense nuligi plurperiodan kampanjon signifas, ke estonte estraranoj ne plu kuraĝos tian tempoperdon, kaj dediĉemos al kurantaj aferoj!

### Kia laborplano?

La strategian planon komitato akceptis (post pli ol 10 jaroj... La red.) en 1988. Ĝi enhavas ĉion por respondi la demandojn de Werdin. Enestas en ĝi, ke iu ajn kompetenta persono povas sugesti realigojn, kaj ilin proponi al UEA. Tiu nia projekto pri reklamkampanjo referencis al la punktoj 8-21-27-30-31 de la *Strategia Plano*, kaj mi esperis, ke la estraro 1989 sin taksos ligita al ĝi.

### Kiel proponi reklamplanon

Kiel komerca eksdirektoro mi ligis la propagandon al financado. Mi renkontis la eksprezidanton G. Maertens. Helpe de lia profesieco, mi adoptis la projekton al la konataj UEA-kondiĉoj. La temo estis: "vendo" de esperanto laŭ komercaj kriterioj. Tio implicis, ke UEA kaj la landaj asocioj dividu la investojn, ke L.A. kaj la grupoj kunordigite reklamu, instru, priservu la informpintojn. Ĉe ambaŭ niveloj planitis elspezoj kaj enspezoj. Amaso de aranĝoj en najbaraj landoj duobligis la efikon. La tuton devus prepari profesiuloj, dum almenaŭ sesmonata periodo.

Tutmonda organizo, sen lingvokomunikaj problemoj, logike interesiĝas eluzi sian plurnaciecon. Malgraŭ diroj de spertuloj,



"Tra densa mallumo  
briletas la celo,  
Al kiu kuraĝe ni iras.  
Simile al stelo  
en nokta ĉielo,  
Al ni la direkton ĝi diras."

(Zamenhof: La vojo)

UEA sisteme rifuzas tiun ĉi temon. Oreloj de estraranoj aŭ direktoroj ne emas al tio. Ve, oni ne tuŝu la rezerveojn! (eble krom por superluksa kongresejo?) Ĉu muroj de ankoraŭ mil jaroj?

Post tia periodo, en Bergeno mi atentigis, ke por trudi la estraron agadi, ankaŭ la Komitato devus "moviĝi". Ĝi aprobis mian proponon, sed nur du aŭ tri anoj en la sekvaj monatoj konfirmis sian jeson... La "parolo" (promeso) de komitatano de validas nur por tri minutoj.

Ĉu tiuj homoj ne raportas al siaj landaj asocioj, aŭ ili estas dekomence senpovaj? Kial ILIN oni elektis?

En Vieno, nova laborgrupo provis defendi la tezon de komerca reklamado, kaj postuli, ke estrarano prirespondeca. Sed la afero fuŝiĝis, ĉar pro balotoj la rezolucio ne estis prezentbla. La balotkomisiono provis prezenti la kandidatojn al estraranejo, sed tro rapide, por ke ili estu demanditaj pri projektoj kaj kapabloj. Ne eblis diri: "mi preferas tiun pro la financoj, tiun pro eksterilitaj planoj, kaj tiun alian pro propagando..." La UEA reguloj faras, ke ne estas kutimo havi ion skribitan. Tiel en la balotoj regas konfuzo.

### Senriskemo

Estas skandale, ke universala asocio ne kuraĝas riski, eĉ unufoje, plurnacian komunikokampanjon. Se UEA preferas nur eldonon de gazeto, jarlibro, katalogo, libro-servon kaj unujaran kongreson... ĝi tion emfazas! Por administrado ne utilas ke dormu kaj profitu al Roterdamaj bankoj tiaj pulsoj, kies ekzisto ebligas ŝtopi truojn.

Administra asocio, se tian ni volus, bezonas nek strategian, nek ambician planon... Ĝi malnoviĝas, kaj ne meritas la internacian rolon, ofte aluditan en kongresaj paroladoj.

### Esperanto tamen bezonas UEA

Amiko de UEA, mi opinias, ke ni devas:

» ŝanĝi deinterne, sed ne krei novan asocion aŭ novajn filiojn, kiel sugestas Werdin, per pli bona konsidero el kaj al la ekzistantaj L.A.

» kontakti spertulojn por alia rigardo al niaj monfontoj, koncerne niajn rezerveojn, eblajn investojn, eventualecon de agada entrepreno laŭ Werdin, aŭ komercaj kampanjoj laŭ Texier;

» postuli, okaze de balotoj, ke la L.A. listigu la neprajn postenojn laŭ utilo, sperto kaj prefero;

» postuli, ke la kandidatoj komuniku frue siajn ideojn, projektojn kaj sugestitan funkcion;

» se la balotkomisiono konstatas gravajn mankojn inter la proponoj kaj bezonoj, doni al ĝi rimedojn por priserĉi kompetentulojn, eĉ per anoncoj en la Revuo Esperanto.

» se necese, alporti la bezonatajn modifojn en la statuton de UEA, aŭ en ĝian regularon.


Jean-Louis Texier,  
eksa estrarano de UEA,  
vic-prezidanto de UFE

## Faka aplikado

### Medicina Revuo

La ĉefaj artikoloj de la antaŭnelonge aperinta 15-a volumo de Medicina Internacia Revuo:

- Ŝanĝiĝo de kaŭzoj de blindeco (R. Makabe)
- La nuna stato de la progresiva afazio (Jordi Serra-Mestres)
- Komencaj etapoj de la malignaj procezoj en la uterocervika surfaco (I.&Cs. Bige)
- Resumo de la signifo de ricevigo en infanaĝa akuta limfoblasta leŭkemio (H. Behrendt)
- Kuracado de toksiga reakcio de streptomicino per gusuibu (Li Huisi kaj Ye Xianghua)
- Uzado de urokinazo kontraŭ miokardia infarkto (Zhao Jianmang)
- Aŭtogrefto de unupeco da lieno en 10 kazoj (Xiang Sunyun Ka)
- Kuracado de skrofolo per tradicia ĉina medikamento (Sugin)
- Kolesterolo kaj korinfarkto (José Róiz)
- Mia opinio pri fastadoterapio (H. Hašidi)
- Dumnokta vidkapablo per haŝiŝo (Schweizer)
- Redonita voĉo (István Hegyi)
- Mispaŝoj en la stomatologia konsultejo (Balázs Szemórk)
- Kuracisto-historiaj faktoj pri "CELLADAM" (Margit Nagy)
- Konformiĝaj problemoj de la ciganinfanoj (S. Rácné Novák)
- IUPAC-kemia nomenklaturado deflankiĝis (Pioro)



Adreso de la redakcio: Saburo Yamazoe, 4-8-9 Iwagami-mati, Maebasi-si, 371 Japanio.

### Farmacia societo fondota!

Estimataj gekolegoj,

gvidataj de la intenco revivigi la farmacian sektion de UMEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio)!

Ni invitas ĉiujn, kiuj deziras partopreni tiun ĉi agadon, sendi sian sinanoncon por taksii la interesiĝon pri la menciita organizaĵo.



**U M E A**

Ni atendas la sinanoncon de ĉiu aktiva aŭ iama apotekisto, kaj tiun de aliaj esperantistaj fakuloj laborantaj en la farmaciista tereno (kuracistoj, farmakologoj, esploristoj, industriaj fakuloj ktp.).

La celo de nia faka organizaĵo estus **PLIFORTIGI LA INTERRILATOJN** de diverslandaj esperantistaj apotekistoj, la disvastigo de la internacia lingvo kaj ĜIA PRAKTIKA

**APLIKADO** inter la farmaciistoj per prezentado de sciencaj prelegoj, esplor-rezultoj, kompilado de faka vortaro, ktp.

Ĝi funkcios kadre de UMEA, surbaze de ĝia statuto kaj espereble ankaŭ per ĝia helpo kaj faka gvidado. Ni atendas viajn proponojn ankaŭ pri la organiza sistemo, pri la nomo de nia societo, pri ĝiaj celoj. Simile ni atendas anonciĝon de tiuj, kiuj deziras kaj povas kontribui en la gvidado, organizado de la apotekista asocio.

Aliflanke ni petas ĉiujn, kiuj legas ĉi tiun alvokon, bonvolu dissendi ĝin por viaj naciaj fakaj revuoj, gazetoj kaj esperantlingvaj periodaĵoj, por havi membrojn el ju pli da landoj. Post kelkaj monatoj, laŭ la nombro de aliĝintoj, la estraro de UMEA decidus pri la refondo de nia asocio. Sendu viajn sinanoncon kaj proponojn al la adreso:

Teresa Jakubowska,  
ul. Kolberga 17 m 36, PL-26-600 Radom,

### Esperantlingva rubriko

La revuo *Napora Zegar Sloneczny* eldonata plejparte en la angla fare de *East European Documentation Centre of Naturism and Related Subject* havas konstantan esperantlingvan rubrikon. EEDCN bonvenigas leterojn kaj konvenajn artikolojn en esperanto. Pliaj informoj ĉe:

EEDCN. Box 3379,  
GR-10210 Athinaí, Grekio.  
OdE-3

### Ĉu vi estas fervojisto?




La Internacia Fervoja Esperanto-Federacio, IFEF, la plej vasta esperantista faka organizo, aliĝinta al UEA, intencas pligrandigi sian membraron en ĉiuj landoj, ĉefe kie ankoraŭ ĝi ne havas lokan organizon. La izolitaj fervojistaj-esperantistoj estas invitataj kontakti la sekretarion de IFEF:

d-ro Romano Bolognesi, via Misa 4,  
I-40139 Bologna, Italio.

### Interlingvistiko kaj esperanto en la Karla Universitato

Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS) kune kun katedro de didaktika teknologio de pedagogia fakultato en Karla Universitato Prago, organizis dum 14-



18. de septembro universitatan kurson por ĉeĥaj sciencistoj kaj studentoj, interesiĝantaj pri interlingvistiko kaj kibernetika pedagogio.

Post la prelegoj de prof. Miloš Lánský kaj prof. Helmar Frank sekvis viglaj diskutoj pri la uzo de la Internacia Lingvo kiel propedeŭtiko por lingvoinstruado, kaj pri uzo de esperanto - modelo por aŭtomata traduko, lingva skemigo ktp. Montriĝis granda intereso ankaŭ pri interlingvistiko kaj ĝia aplikeblo en moderna lingvoscienco kaj ĝiaj najbaraj disciplinoj.

Dr. Véra Barandovská-Frank gvidis 10-horan preparkurson de la Internacia Lingvo por sciencistoj, kompletigitan per seshora videoprogramo. Aliĝis deko da instruistoj de la Karla Universitato. Multaj el ili parolas 2-3 eŭropajn lingvojn kaj estis mem surprizitaj, ke post tritaga preparo ili kapablis legi senprobleme sciencajn tekstojn kaj sekvi fakajn prelegojn en la Internacia Lingvo. Estis alte aprezita la seriozeco de la seminario kaj la taŭgeco de ties lingvo por scienca agado.

Kontaktadreso por AIS:

Prezidanta Sekretariejo,  
Kleinenberger Weg 16 B,  
DW-4790 Paderborn, Germanio.

## Komerca aplikado

### Kontaktoj serĉataj!

La firmao "Majak" en Veliko Tarnovo serĉas partnerojn por kunagado. Ĝi eksportas agrikulturaĵojn, organizas restadon de turismaj grupoj en Veliko Tarnovo, havas interesojn pri teknologioj kaj materialoj por fasadaj lumreklamoj, hobiaj elektronikaj, horloĝaj mekanismoj, teknologioj por produktado de faruno el cepo.

Majak, pk. 276, BG-5000 Veliko Tarnovo, Bulgario. Telefono: +359-62-23606.

La privata komerc-turisma firmao MARAN (Moskvo, Rusio), interesiĝas pri negoĉo de diversaj konsumvaroj el via lando. Oni pretas pagi per dolaroj aŭ aranĝi reciproke profitan barterkomercon, komunan produktadon.

Plej gravas kvalito, nivelo de prezoj kaj rapideco de liveraĵoj. Oni havas eblecon loĝigi grupojn da turistoj en unuaklasaj aŭ en apudurbaj pli malmultekostaj hoteloj, kaj garantias vizitojn al ĉiuj vidindaĵoj kun gvidistoj, parolantaj esperante kaj en iu nacia lingvo; do temas ne nur pri esperantistoj.

Viaflankaj demandoj kaj proponoj estas bonvenaj laŭ nia tel/fakso:

+7-095-9288049, Marian Stepanov.  
el Monato, 11/92.

## Aranĝoj

9-a Internacia Festivalo

### JARFINA ARANĜO POR MEZAĜULOJ!

27.12.92 - 03.01.93.

Maloftas la e-aranĝoj, kiuj celas la mezan generacion. IF ja estas ĝuste tia, kaj invitas vin renkonti la novan jaron en Kloster Hochst, je 50 km-oj sudoriente de Frankfurto.



IF prezentas specifan programon por la dua generacio (25-55 jaraĝo) kaj junaj familioj kun aŭ sen infanoj.

Kadra temo: "Turismo en Esperantujo". Al IF estas atendataj ĉefe flue parolantaj ge-

esperantistoj, sed por komencantoj (ekz. via partnero) estos organizataj lernigaj kaj paroligaj kursoj.

Loĝigo en 1-2 litaj ĉambroj, aparta programo por la infanoj! Prelegoj kaj kursoj dumtage, interesa programo vespere. Tradicia silvestra balo kun granda bufedo!

Kotizo: 350 DEM por plenkreskuloj (ĝis 30.11.92). Specialaj kondiĉoj por netranspagaĵovaj landoj!!!

Petu detalajn informojn de:

Hans-Dieter Platz,  
PF. 1148, DW-3501 Niedenstein, Germanio.  
Telefona: +49-5624-8007,  
telefaksa: +49-5624-322.

## Silvestra Renkontiĝo en Sankt-Peterburg!

La E-Societo "ESPERO" invitas vin renkonti la novan jaron en Sankt Peterburg. La aranĝo daŭros inter la 30-a de decembro ĝis la 2-a de januaro. Antaŭvidita prezo: ĉ. 1300 rubloj.



Detalajn informojn petu ĉe: pk. 130, RUS-197022 St-Peterburg, Rusio.

## Katolika E-Ĥendaro

De la 8-a ĝis la 22-a de aŭgusto okazis en Sebrancie apud Litomyšl la 14-a Katolika Esperanto-Tendaro de la ĉeĥa IKUE-Sekcio. Partoprenis ĝin 70 kredantoj el Ĉeĥoslovakio, Polio, Francio kaj Germanio; ĉirkaŭ la duono estis gejunuloj kaj infanoj. La aranĝon karakterizis amika atmosfero, multa kantaĉo, ĉiutagaj mesoj gvidataj de patro Savio Rířica, kaj iom strikta, skolteca tagordo.



Post kiam de 1977 ĝis 1989 la ĉeĥa IKUE-Sekcio povis nur kaŝe agadi, ĝi en la lastaj jaroj rapide refortiĝis. Pri ĝiaj aktivado kaj aranĝoj informas:

Miloslav Sváček,  
Tršická 6, CS-751 27 Penčice.

Sukcesis la nova iniciato

## Internacia Kongreso por la pli aĝa delegacio

Pri la signifo de e-kongresoj oni multe kaj diverse skribis kaj skribas. Tamen absolute senduba estas ilia unuiga kaj emociiga rolo.

Organizado de internaciaj kongresoj postulas grandan organizon fortostreĉon de tutaj kolektivoj, preparlaboron dum pluraj monatoj. Tamen Herman kaj Margarete Schmid, prezidanto de Bavara E-Ligo post pluraj antaŭaj kongresoj (1970-SAT, 1977-SAT, 1985-UK), denove prenis tian taskon.

Ĉi foje la ideo estis aranĝi internacian kongreson por la pli aĝa generacio. La ideo estis vere bona, la tempo taŭga, kaj tiu kvindekaj el 6 landoj, kiuj ĝin ĉeestis, certe elportis hejmen la plej bonajn impresojn.

La aranĝo daŭris de la 6-a ĝis la 12a de septembro en *Kolpinghaus*. Samloke okazis la kunvenoj, troviĝis la restoracio, do ne estis grandaj distancoj. Entute konvena loko por ĉi-speca aranĝo.

La programo estis riĉa, varia, kaj ankaŭ akordigita al la aĝo de la partoprenintoj. Zofia Banet-Fornalowa prelegis pri la E-teatro, Stefan Maul, prezidanto de TEĴA pri internacia komunikado kaj pri ĝiaj sociaj kaj politikaj sekvoj, estis diskuto pri la demando "Kial esperantistoj kongresas?", estis pluraj kaj tre interesaj ekskursoj, inter ili ekz. al la biblioteko de Germana Esperanto Instituto en Aalen, okazis pluraj artaj prezentoj, kiel spektakloj de Jerzy Fornal el Varsovio aŭ "mirakla" programo de la budapeŝta magiisto Árpád Szegedi.

Estis agrable kunesti inter homoj, kiuj pro la aĝo jam multon vidis-spertis, kaj povas aprezi valoraĵojn de la vivo.

Estus bone, se iu daŭrigus la aranĝon, lanĉita de s-o Schmid, ĝi montriĝis trafa!

Zofia Banet-Fornalowa, Varsovio

Frukto de kunlaboro en MezEŭropo:

## MezEŭropa Junulara Semajno

De la 9a ĝis la 16a de aŭgusto okazis en la ĉarma nordmoravia urbo Olomouc renkontiĝo de esperantistoj-gejunuloj kun subtitolo "MezEŭropo prezentas sin", do evidente aranĝo celanta ion novan.

Oni iniciatis pliprofundigi kunlaboron inter unuopaj mezeŭropaj sekcioj, kaj krei internacian etoson ne nur venante el pluraj ŝtatoj, sed ĉefe kontribuante al la komuna programo, kies faka temo estis: *Ĉu komuna lingvo sufiĉas?* Vasta spaco ofertis sin kompreneble ankaŭ sur la kampo de t.n. distra programo. Bedaŭrinde - verdire - la intenco ne centprocente sukcesis. Unuopuloj sufiĉe "abunde" plimultigis la nombron de programoj, sed laboro de sekcioj, kiel tuto, ne videblis. Do pezo de la programoj restis pli malpli sur la dorso de ĈEJ, la ĉeforganizanto.

Koncerne la fakan parton, oni multe rilak-

sis, psikoekzercis, interreligie kunvenis, diskutis pri psikaj barieroj de la komunkiado, do



oni preferis praktike lerni ol teoriemi. "MezEŭropo" tamen prezentis sin dum forumoj

pri la nunaj Ĉeĥoslovakio kaj Polio, kaj dum la nacia vespero, plena de moraviaj folkloro kaj vino... Kiel kutime okazis paroliga kurso, kiun partoprenis ekz. la ĵusaj kursfinitoj de la internacia lingvolernejo, komune organizita de ĈEJ kaj GEJ. Krome, ja ĉeestis kelkaj estraranoj, ne mankis la TEJO-forumo.

Post iom pli serioza (ne ĉiam tro... kompreneble) taga programo sekvis preskaŭ malserioza parto, - la vespero. Oni freneze dancis, amuziĝis ĉe fiŝlagetoj, kantis, do tradicie internacie vesperumis.

La aranĝo sukcesis, sed ĉu oni denove organizos ion similan, restas ĉi momente ankoraŭ "inter steloj".

Vladka Chvátalová

La analizo de la ĉijara aranĝo, kaj la sekvaraj planoj certe estos diskutataj dum la 2a "Mezeŭropa E-Junulara Konferenco", kiun novembrofine partoprenos reprezentantoj de ĉeĥa, germana, hungara, itala, pola, slovaka kaj svisa junularaj e-organizoj. La red.

## Propagando

### KION FARI rilate al la angla?

#### Konstatoj

1. Vole nevole ni objekte konstatu, ke nun la angla, germana NECESAS en pluraj kampoj.

2. Estus stulte proponi tujan anstataŭigon de la angla per esperanto, ĉar en nia lingvo ekzistas nur minimuma kvanto de baza fakliteraturo, kaj ne multas fakuloj, kiuj kompetente scipovas la internacian lingvon.

3. Tro ofte esperantistoj reagis neracie, absurde, kiam iu parolas aŭ skribas favore al la angla kiel internacia komunikilo.

#### Ĉu sekve ni faru nenion?

1. Neniel ni iru kontraŭ la fluo! Rekonu la pozitivan rolon de la angla, sed eble tuj aldonu ĝiajn mankojn: ne en ĉiuj branĉoj (ekz. ĉe la poŝto, medicino), kaj ne ĉie (Sudameriko, Orienta Eŭropo) ĝi estas uzata.

2. Neniam parolu nur sola pri la angla lingvo, ĉiam diru, ke "germana, angla, franca lingvoj!"

3. Ni honeste akceptu, ke nuntempe la angla, germana, franca nepras en internacia nivelo, kvankam ni samtempe substreku tiun bedaŭrindan diskriminacion, kiu gravege favoras la gepatro-lingvanojn kaj kiu malobservas la Universalan Deklaracion pri la Homaj Rajtoj (art.2a).

4. Celo de via argumentado estu ne la ekskluziva uzo de e-o, sed ĝia paralela uzo samrajte al aliaj lingvoj!

5. Ni atentigu pri la propedeŭtika valoro de esperanto, per kiu eblas pli facile kaj pli bone lerni fremdajn lingvojn.

6. Ni rimarkigu, ke dum la lastaj jaroj pli kaj pli da scienculoj uzas e-on kiel laborlingvon, samrajte kun la angla, dum internaciaj renkontiĝoj (havu preparitan liston por demandoj!).

5. Ni subtenu la ĝisdatigon kaj kompletigon de fakterminologio en e-o, por ke ĝi fariĝu uzebla lingvo samnivele kun la angla; same ni laŭeble subtenu asociojn, kiuj jam uzas la internacian lingvon kiel laborlingvon.

#### Por riĉigi nian argumentadon

1. Propedeŭtika valoro de e-o por la lernado de la angla, franca, germana ktp. lingvoj.

2. Ankaŭ via nacia lingvo estas same bela, esprimkapabla, kaj havas la samajn rajtojn.

3. Nekompleta listo de internaciaj sciencaj renkontiĝoj en 1990, kun e-o kaj la angla inter la laborlingvoj:

- Budapeŝt, Hungario, 26-28 jan.: Internacia konferenco kaj ekspozicio "Trafiko kaj medioprotekto" (Ekonomia Universitato, Budapeŝt IX);
- Bialystok, Pollando, 18-25 febr.: 3-a sesio de la pola filio de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj);
- Beijing, Ĉinio, 25-30 majo: 3-a Internacia

## Interrojuo

Direktoro de la Internacia Esperanto Muzeo en Vieno

### Herbert Mayer

Intervjuo de la revuo Moskva Gazeto kun Herbert Mayer dum la UK en Vieno

*M.G. Unue bonvolu diri kelkajn vortojn pri vi!*

H.M.: Mi laboras en Internacia Esperanto-Muzeo, kiu estas parto de la aŭstria biblioteko, laŭprofesie mi estas bibliotekisto. IEM posedas 20 mil volumojn en esperanto kaj en aliaj planlingvoj. Fakte ĝi estas la plej granda funkcianta e-biblioteko. Ĝi daŭre akiras librojn, ni katalogigas ilin, kaj poste ni disponigas tiujn librojn al la publiko. En Eŭropo eblas elprunti librojn tra elprunta internacia reto. Multaj homoj utiligas tiun servon. La dua parto de nia instituto estas la muzeo; kiun ni nun renovigas, sed kio estas ege multekosta, al ni mankas multe da mono. Por fari ĉion ni bezonas ankoraŭ unu milionon da ŝilingoj. Kaj mi ne scias, kiel ni atingos tion, do fakte ni devas halti en la restaŭrado de la muzeo en la unua parto. La ŝtato helpas en tiu senco, ke ĝi pagas la salajron al ĉiuj bibliotekistoj, kiuj laboras en la muzeo. Kaj ne estas lupago.

*MG: Kiom da ekspozitaĵoj estas en la muzeo?*

H.M.: Nun estas ekspozitaj tre eta parto de manuskriptoj, sed ni havas proksimume cent mil objektojn, kiujn ni kompreneble ne povas ekspoziti komplete.

*MG: Kiom da vizitantoj venas al la muzeo kaj al la biblioteko?*

H.M.: Inter 5 kaj 6 mil jare, kiuj estas plejparte ne esperantistoj. Tiujn homojn ni informas tre efike pri esperanto. Ekde kiam ni havas inform sistemon pere de kluboj, kiujn la vizitanto povas preni en manojn, ekzemple



la vendokvanto de lernolibroj ĉi tie dekobliĝis. Antaŭe ni vendis du lernolibrojn dum unu jaro, nun ni jam vendas inter 20 kaj 30 dum unu monato. Sed kiel mi diris, ankoraŭ ne estas finfarita la ekspozicio.

*MG: Kiamaniere esperantistoj el aliaj urboj, landoj povas uzi la muzeon?*

H.M.: Iru al la loka biblioteko, ekz. al la loka universitata biblioteko kaj pere de tiu biblioteko oni povas elprunti librojn en tuta Eŭropo.

*MG: Kiel oni povas ekscii, kiuj libroj estas ĉi tie?*

H.M.: Se vi serĉas precizajn titolojn, vi povas skribi al ni kaj ni povas informi vin, ĉu estas tiuj titoloj. Sed se temas pri esperantaĵoj, la verŝajneco, ke tio troviĝas en E-Muzeo estas tre granda.

*MG: Kaj se oni ne scias precizan titolon, sed serĉas laŭ temo?*

H.M.: Oni povas skribi kaj demandi ĉu estas libroj pri tiu temo? Aŭ kiuj gazetoj aperis en la dudekaj jaroj en Soveta Unio? Tiujn demandojn ni povas facile respondi, ĉar ni havas katalogon. Sed se temas pri komplikaj aferoj, ekz. kiom da artikoloj de la aŭtoro X estas en diversaj revuoj, ni devus serĉi dum jaroj, tion ni ne povas fari.

*MG: Kiamaniere vi kompletigas vian fondaĵon?*

H.M.: Pli grande per donacoj kaj per interŝanĝo. La buĝeto, kiun ni havas, elĉerpiĝas preskaŭ plene por la bindado, do por aĉetado nia buĝeto preskaŭ ne ekzistas.

*MG: Iom pri la historio...*

H.M.: La muzeon fondis en 1927 Hugo Steiner - fervoja oficisto kaj tre diligenta kolektanto. Ekde 1928 ĝi estas parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Do vi vidas jam 65 jarojn, kaj ni seninterrompe kolektas dum pluraj jardekoj. La muzeo estis fermita, tamen, dum la nazia okupado de Aŭstrio dum ses jaroj, sed malbedaŭrinde nenio perdiĝis.

Kontaktadreso:

*Internacia Esperanto-Muzeo, Batthyany stiege, Hofburg, A-1010 WIEN 1, Aŭstrio.*

*El Moskva Gazeto, jul/aŭg. 1992.*

akademia konferenco pri sciencoj kaj teknikoj (Ĉina Akademio de la Sciencoj);

- San Marino, 1-10 sept.: SUS 7, Sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj;
- Poprad, Ĉeĥoslovakio, 12-14 sept.: 5-a TAKIS-konferenco INTERKIBERNETIK'90 (Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informatiko kaj Sistemiko);
- Bialystok, Pollando, 16-24 sept.: SUS 8, Sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj.

#### Konkludo

Preferinde estas aktive kunlabori ol teorie kontraŭargumenti!

*Germain PIRLOT, Oostende, Belgio*



## Movado

### Senpaga Kongresejo en Valencio

La vic-urbestro de Valencio, Vincente González Lizondo, oficiale komunikis per letero al la LKK de la 78-a Universala Kongreso de Esperanto (24-31. VII. 1993), ke laŭ decido de la Ĝenerala Asambleo de la Urbeŝtraro, oni decidis subvencii la tutan koston (ĉ. 60.000 USD) por la uzo de la Palaco de Muziko en Valencio kiel kongresejo. Estas la unua fojo, ke iu kongreso en tiu palaco estas subvenciata!

Ankaŭ la Konsilantaro pri Kulturo de la Valenciana Aŭtonoma Komunumo informis, ke ili subvencios la kongreson per proks. 20.000 USD!

La vic-urbestro González, kiu estas samtempe skabeno pri kulturo kaj membro de la hispana Parlamento, speciale vojaĝis al Vieno por inviti dum la Fermo al la 78-a UK en Valencio.



laŭ *Heroldo*, 9/1992

### Nova adreso de VERDIRE

La ekologiisma gazeto VERDIRE, kaj ties redaktoro Claude Rouget havas novan adreson:

pk. 2280, N-9002 Tromsø, Norvegio.

## Albana lotuso

Kien ajn veni en la granda eks-socialismo, oni renkontas disfalon, transformon kaj novordigon. Preskaŭ apokalipsa torento glutis la malnovajn reĝimojn kaj nun tro ofte lasas la popolojn en marĉo de kaoso, mizero kaj senespero, sur kiu kreskas nur malmultaj lotusoj de la espero.

Albanio, antaŭ nelonge ankoraŭ provinca sian tute propran vojon en apenaŭ ĝenata izolo, ŝajnas esti inter la plej abrupte kaj forte trafitaj. Industrio neadapteble antikviginta, agrikulturo baziganta sur azenaj dorsoj, preskaŭ kompleta senlaboreco, lernejoj kies fenestroj estas senvitraj, kaj kies lernantoj disponas nek librojn - el kiuj lerni, nek pape-rojn - sur kiujn skribi, - sed en kiuj okazas esperanto-kursoj!

Kvazaŭ kiel fabela lotuso aperas la antaŭnelonge ekĝerminta esperanto-movado en la ĝenerala mizero de la lando. Ne pli ol manpleno da aktivuloj sukcesis ene de du jaroj - la malnova reĝimo estis aktive subpreminta

Ĉiujare OSIEK (*Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj*) organizas en julio unusemajnan konferencon. Originala specifa celo de OSIEK estas atribui ĉiujare premion al nefikcia verko de vivanta aŭtoro. Ĉiu OSIEK-ano rajtas proponi antaŭ la konferenco du premiindan laŭ li verkojn. La 5 plej ofte proponitaj verkoj estas detale prezentataj dum la konferenco. La lastan tagon okazas duobla sekreta voĉdonado de ĉiuj ĉeestantaj OSIEK-anoj por elekti la premiatan libron. La nuna valoro de OSIEK-premio estas 300 ekuoj (ĉ. 230 USD).

Ĉi-jare, dum la Internacia Esperanto-Konferenco en Ateno, la 23an de julio, d-ro Ebbe Vilborg ricevis la premion pro lia verko, nepre necesa al ĉiuj amantoj de nia lingvo: *"Etimologia Vortaro de Esperanto"*. La unuaj du volumoj jam aperis, kaj la tria aperos ĉi-aŭtune.

## EBBE VILBORG

D-ro Ebbe Vilborg estas eble malpli konata de esperantistoj ol niaj fekundaj beletristoj, vervaj prelegantoj aŭ brilaj artikolistoj.


Li naskiĝis en Göteborg, Svedio, kaj doktoriĝis en 1955, estante sub 30a aĝo. La sekvan jaron li fariĝas docento en la universitato de Göteborg, kaj kelkajn jarojn poste lektoro pri la greka, la latina kaj ĝenerala lingvistiko.

Li lernis esperanton en 14a aĝo. En 1958 kompilas vortaron (*Lilla Esperanto-ordboken*), kaj montriĝas agenda en la Akademio de Esperanto (1962-1976).

Ĉiuj verkoj de E. Vilborg rilatas al lingvistiko: *Vortaro sveda-esperanta*, *Suplemento al la vortaro*, *La partecipa problemoj en la Aka-*

*demio*, *Esperanto - moderna lingvo*, eldono de interlingvistika cirkulero *Fokuso* (1967-1976).

Ĉi-jare la *Etimologia vortaro* post 1991 denove estis proponita al la OSIEK-premio, - kaj gajnis ĝin antaŭ la konkurenta libro: *La danĝera lingvo* de Ulrich Lins.



Eksciinte pri la premio, Vilborg reagis kun danko:

*... Mi sentas min tre honorata pro tiu rekompenco donita al mi! ... La tria volumo estas prespreta kaj supezeble aperos dum aŭtuno.*

*Mi ne povus imagi kialon, pro kiu oni rifuzus tian premion! Kompreneble mi akceptas ĝin, kun ĝojo kaj dankemo. Laŭ mia memoro, tio ĉi estas la unua fojo, kiam mi ricevas rekompencon pro laboro serve al esperantistoj...*

Gratulojn al Ebbe Vilborg al la ricevita OSIEK-premio, kaj dankojn pro la farita laboro!

laŭ la materialoj en *"La Gazeto"* kaj *"Dialogo"* n-ro 42.

ilin kaj malebligis ĉian aktivadon - fondi Albanan Esperanto-Ligon, akiri por ĝi leĝan aprobon, instrui la lingvon al plurcento, krei reton el dudeko sa kluboj, eldoni same grave kiel modeste lernolibron, tradukon, originalaĵojn kaj revueton, starigi vastajn kontaktojn kun



la movado tra la mondo kaj ellabori agadplanon plena je aŭdaco kaj prudento.

Multo de la atingitaj rezultoj sukcesis nur dank' al la helpo el eksterlando. Evidentas, ke

ankaŭ estonte ĝi restos tiel. Sed la albanaj esperantistoj - male al multaj aliaj grupoj en la lando - klare konscias, ke la pli granda parto povas realiĝi nur per la propra laboro kaj konstanta penado. La prezidanto Gafur Muĉo kaj liaj samideanoj senlace kaj kuraĝe klopodas akiri reputacion, adeptojn kaj firman organizan bazon por esperanto en Albanio.

Tiuj nepre amikindajn, seriozajn fervorulojn povus ege helpi vizitoj (neforgeseblas mem sperti ilian hontige varman kaj regalan gastamon), e-turismo en ilia historie kaj kulture riĉega, svise bela lando, subteno de iliaj eldon(ej)aj planoj per papero, presmaŝino ktp. (ĉi tie troviĝas por ili efektiva ŝanco en ankoraŭ merkata vakuo)! Ankaŭ eblas tra ili donaci al lernejoj stokon da kraĵoj kaj skribiloj, aŭ, aŭ, aŭ...

Kontaktu ilin:

*Albana Esperanto-Ligo, s-ro Gafur Muĉo, Rruga "Thanas Ziko" 56, Tirana, Albanio. Telefono: +355-42-33258.*

*Bernhard Westerhoff, Germanio*

# ILEI

## Ne tiom mizera, tamen ne brila!

En "Eventoj" 12, (p.5.) Suzana Sz. Virág prave konsterniĝis pri la ekstreme modesta rezulto en la enketo de ILEI pri lerneja instruado en 1991. La trovita sumo de 2455 aspektas vere mizere. Tamen ĝi montras pli la nereagemon de niaj membroj ol la faktan staton de instruado. El la enketoj de 1989 kaj 1990 ni sukcesis malkovri ĉ. 10,000 lernantojn inter la aĝoj de 5 kaj 18 tra la mondo. Ni tamen ne tuj ĝoju: por kontentige granda ekonomumo, ni devus trovi almenaŭ la **kvaroblon** de tio! Tamen restas la konkludo, ke la instruado de esperanto, la trejnado de instruistoj kaj instruisto-trejnistoj grandskale lamas malantaŭ la bezono subteni adekvatan ekonomumon. Klaras, ke la movado ne investas sufiĉe tiukampe. ILEI en 1992 transformas sian enketilon al kontaktilo; krome devigas sin oferti en 1993 instruistajn kursojn kun 50 lokoj, kaj en 1994 cent lokoj.



Grupeto de partoprenintoj en la ILEI-seminario inter 06-09. novembro.

Suzana prave levas la demandon pri la amplekto de elementoj de la e-kulturo kaj vivo en la lernado. ILEI tion atentigas en la kreado de instruprogramoj kaj ekz. en nia nova Gimnazio. *La minimuma nombro de esperantistoj (parolantoj aŭ movadanoj) rezultintaj el la lerneja instruado signalas la mankon de adekvata pontado inter la du.*

Por kontentige aliri ĉiujn el ĉi tiuj demandoj ILEI simple ne havas la rimedojn - nek financajn, nek homajn. Por fari ĉion ĉi, ni devas konvinki la tutan movadon por rezigni pri sia nuna starpunkto: *"Ha, instruado... jes, grava demando... sed faka demando... kaj feliĉe ni povas lasi tion en la manoj de ILEI!"* Ne ĉiuj kompetentuloj, kaj apenaŭ iuj financaj rimedoj troviĝas ĉe ni! Ni iniciatos kaj kunordigos, sed ne imagu, ke ni ĉion necesan povos fari!

Stefan MacGill

EVENTOJ, eszperantó nyelvű információs lap.  
Nyit. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.

A kiadó és a szerkesztőség címe:

H-1675 Budapest, pf. 87. Tel.: 1288258.

Megjelenik kéthetente. Kézbesíti a HELIR.

Készült az M & M nyomdában:

H-1161 Budapest, Bercsényi u. 10.

EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.

Eldonas Kultura Esperanto-Asocio

kaj LINGVO-Studio, Budapest.

Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.  
La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavo.

## Esperanto en radio

### Konkurado ĉe la Pola Radio

Ĉe la fremdlingvaj elsendoj de radiostacioj ĉiumonate oni kalkulas la nombron de alvenintaj poŝtaĵoj, por taksu la popularecon de la elsendoj.

Ĉe la Pola Radio oktobre la e-elsendoj okupis la duan lokon!!! La unua iĝis la germanlingva elsendo, ricevinte 248 korespondantojn, dum nia elsendo havis 189. La e-elsendoj superis la anglan redakcion kun 122 leteroj.


En esperanto plej da leteroj venis el Germanio (48), kaj per tio rompis la ĝisnunan

"finnan hegemonion", ja el Suomio venis ĉiumonate "nur" 41 korespondantoj. En la vico sekvas Nederlando (37), Ĉeĥoslovakio (15), Litovio (9), ktp.

Redaktoro de la elsendoj Andrzej Pettyn multe dankas la reagojn, kaj daŭre atendas ilin.

Memoru, ke la esperanto-elsendo okazas je 14.30 - 15.00 UT en la 31, 41, 49 metra mallonga bendo kaj 200 m mezondo, kaj je 21.30-22.00 UT en la 41 m., 49 m. kaj 200 metra ondolongo. (En Mezeŭropo aldonu unu horon).

Pola Radio,  
Esp.-Redakcio,  
PL-00-950  
Varsovio, pk. 46.



## Konkurso

### BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 1993

La plej prestiĝa konkurso de la movado ree invitas al kreado de originalaj kontribuoj al la esperanta kulturo. Sep diversaj branĉoj atendas konkursaĵojn, kies kremon oni distingos per *MONPREMIOJ*, pli altaj ol pasintjare.

Ĉi-foje UEA aparte alvokas ĉiujn muzikemajn esperantistojn - unuopulojn kaj grupojn - por partopreno en la branĉo de kantoj. La muzika esperanto-kulturo disfloras en la lastaj jaroj, sed tio ne montriĝis kiel pli vigla partopreno en la Belartaj Konkursoj.

La konkursaĵoj de ĉiuj branĉoj devas esti novaj kaj (escepte de la infanlibroj) ne publikigitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj:

- Poezio:** Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.
- Prozo:** Maksimuma longo 200x65 tajpospacoj. Tri premioj.
- Teatraĵo:** Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.
- Eseo:** Teme ligita kun esperanto aŭ kun la temo de la 78-a UK: "Klerigo por la 21-a jarcento". Premio Luigi Minnaja.
- Kanto:** Teksto kaj melodio povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio An-okin.
- Fotografio:** Teme ligita kun esperanto aŭ la temo de la 78-a UK. Tri premioj.
- Vidbendo:** Temo prefere ligita kun esperanto. Maksimuma daŭro 30 minutoj. Sistemo VHS/PAL. Tri premioj.
- Infanlibroj:** Originala aŭ tradukita libro, presforme aperinta en 1992. Unu premio.

#### KONDIĈOJ:

- » Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni devas sendi la konkursaĵojn en kvar ekzempleroj kaj ili devas alveni plej laste 1993.03.31. Por fotografio kaj vidbendo oni sendu po unu ekzempleron antaŭ 1993.07.01. Por la infanlibra branĉo la eldonejoj sendu po tri ekzemplerojn por alveni plej malfrue 1993.03.31.
- » La konkursaĵojn oni sendu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NE-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
- » Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. La konkursaĵoj (krom vidbendoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj. En aparta koverto estu enfermita la vera nomo kun adreso. Oni aldonu 5 internaciajn respondkuponon por ĉiu branĉo, en kiu oni konkurasas.

#### PREMIOJ:

Unua premio: 370 gld. Dua premio: 259 gld. Tria premio: 148 gld. Luigi Minnaja kaj An-okin: 370 gld. Nova Talento (por la plej bona konkursanto antaŭe ne premiita) 259 gld. Infanlibro: 777 gld.

#### PUBLIKIGO:

La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la Konkursoj.

#### PLI DETALA REGULARO

haveblas kontraŭ unu respondkuponon ĉe la Centra Oficejo de UEA.



## Lingvo

Daŭre oni intermiksas la vortojn *ŝati* kaj *plaĉi*. Jen ekzemplo de la ĝusta uzado:

*La muziko plaĉis al mi.*

*Mi ŝatas la muzikon.*

Aŭ, se vi ŝatas proverbojn, eble pli plaĉas al Vi la jenaj Zamenhofaj ekzemploj:

*Al ĉiu besto plaĉas sia nesto.*

*Kiu hundon mian batas, min mem ne ŝatas.*

\*\*\*

En la revuo MONATO 92/1 estis novelo de Higinio Garcia, en kiu oni povas legi la jenajn frazojn (temis pri AIDS):

*"Estis iposo, imunperda sindromo. Triviale dirite, koita pesto."*

Se mi havus adreson, mi tuj sendus poŝtkarton por gratuli kaj danki. Iposo! Tiom bela kaj esperanta vorto, kompare al la duone asimilitaj importitaj jargonaĵoj, kiuj normale nin plagas!

E.T. Grimley Evans  
el La Brita Esperantisto, nov-dec/92.

## Karaj legantoj,

certe vi rimarkas, ke niaj novembraj numeroj malfruas. Ni klopodas baldaŭ reatingi nian kutiman ritmon.

Responde al multaj demandoj: la baza abonkotizo al *EVENTOJ* por 1993 estas 59 guldenoj (aerpoŝte 68 guldenoj), por eksociandoj: 23 guldenoj.

Hungaraj abonantoj atentu! La baza abonkotizo por '93 estas 980 forintoj, sed tiu sumo validas, nur se ni ricevas ĝin antaŭ la 31a de decembro. Pro la planita enkonduko de AVI (*AldonValora Imposto, hungare: AFA*) ankaŭ por gazetoj, al tiu prezo povas aldoniĝi 10 aŭ 25 procentoj, depende de la leĝo. Ŝparu tiun sumon, kaj abonu al *EVENTOJ* en decembro!

La red.

## Internacia konkurso por lerneĵanoj

### 2-A TASKFOLIO POR MEZLERNEĴANOJ

1. Diru per unu vorto uzante sufiksojn: (3 poentoj)  
a) *faru ke io ne havu koloron* b) *viro, kiu vivas sola* c) *doni akvon al plantoj*
2. Kiuj tabelvortoj mankas el la suba proverbo? (2 poentoj)  
*... scias ..., sed ... scias ...*
3. Kiajn lernilojn vi havas? Skribu almenaŭ ses vortojn! (3 poentoj)
4. Skribu la antonimojn (sen malvortoj): (3 poentoj)  
*paroli, ekstari, demandi, ridi, trista, infano*
5. Klarigu la diferencon! En kiu glaso estas akvo? (2 poentoj)  
*Mi petas glaŝon da akvo. / Mi petas glason de akvo.*
6. Difiĝu la vorton: *esperantisto*. (2 poentoj)
7. Kun la gepatroj vi veturos Vienon. Nun vi atendas la ekspresan trajnon. (3 poentoj)  
*Ĝus vi aĉetis la biletojn. Kion vi diris al la ĝiĉetisto?*
8. Pri kio vin memorigas la datoj: *15.12.1859. / 14.04.1917*. (2 poentoj)

**ONI POVAS IAM AJN ALIĜI AL LA KONKURSO!** Regularon pri la konkurso vidu en la numero aŭgusto (1)-92. La solvojn sendu al:

*Bányai Júlia Gimnázium, Esperanto-grupo Nyíri út 11.  
H-6000 Kecskemét, Hungario.*



## Korespondi deziras

Mi estas 67 jaraĝa emerita fervojisto kaj loĝas en sudorienta parto de Francio. Mi deziras korespondi al Hungario, Rumanio kaj landoj el eksa Sovetio. Pierre Lochon, 1300 route de Callas, F-83490 Le Muy, Francio.

Grupo da mezlerneĵanoj 8-10-jaraj dez. korespondi:

Sabrina REBBOUH (10-jara knabino), 7 rue J. Moulin - 09 600 LAROQUE d'Olmes, Francio;  
Raphasi COMTE (9-jara knabo), 09 120 Saint-FELIX-de-Rieutort, Francio;

Meile MANCEAU (10-jara knabino), ch. Peyreblanque, 09 100 PAMBERS, Francio;

Caetan FAUCQUEUR (10-jara knabo), 17 Haute de Laroque, 09 600 LAROQUE d'Olmes, Francio.

Mi estas 24 jara instruistino. Mi interesiĝas

pri multaj aferoj, ĉefe pri literaturo, turismo, popolkutimoj, kuirarto, instruaj sistemoj, ktp. Mi volonte korespondus al diversaj landoj. s-ino Éva Gergely Palczertné, Domokos str. 26. IV/20, H-4027 Debrecen, Hungario.

Du knabinoj (8 kaj 9 jaraĝaj) kaj du knaboj (10 jaraj) volas korespondi kun samaĝaj hungaraj geinfanoj en esperanto. Skribu al la adreso de la instruistino:

F-ino R.D. Tabram, 34 Bradstone Ave. Folkestone, Kent, Britio.

La fratinoj Elisa (14-jara) kaj Sara (12-jara) SACCARDO serĉas korespondajn konojn dise en la mondo. Via Campodoro 37, I-35010 Villafranca (Padova).

19 jara studentino deziras korespondi kun diverslandaj samaĝuloj. Silvia Georgieva, k. Mladost, bl. 1-A, ap. 22, BG-3000 Vraca, Bulgario.

## Movada lernejo

### Agado de OSIEK

Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj, *OSIEK* atribuas premion dum la Internaciaj Esperanto-Konferencoj, *IEK*, al nefikcia verko internacilingva. Tiu ĉi verko rajtas esti esperantigaĵoj aŭ verkoj originale verkita en nia lingvo. La premion ne atribuas ia komitato, sed la membroj mem de la societo laŭ la jena metodo:

- Dum la jaro antaŭ la *IEK*, ĉiuj membroj rajtas sendi po du premiindajn titolojn al *OSIEK*. *OSIEK* publikigas en *LA GAZETO* la titolojn jam proponitajn.
- Dum la kunvenoj de *IEK* la kvin plej ofte proponitaj titoloj estas prezentataj al la ĉeestantaj membroj de la societo.
- Dum la ĝenerala asembleo de la societo

la ĉeestantaj membroj per duobla sekreta voĉdonado determinas la premiindan titolon.

Estas premieblaj ĉiuj tekstoj pli ol cent paĝaj ankoraŭ ne premiitaj, jam eldonitaj, de vivanta aŭtoro. Ĝis nun estis premiitaj: *Zamenhofs Ekzemplaro* de Rihej Nomura en 1990a, *Mil jaroj de kristana filozofio* de Evaldo Pauli en 1991a, *Etimologia vortaro de Esperanto, vol.1/2*, de Ebbe Vilborg en 1992a. Ne estas premieblaj noveloj, romanoj, poeziaĵoj. Rajtas sendi premiopropojn ĉiu membro de *OSIEK*, kiu jam pagis sin kotizon por la jaro 1993a. La tre malalta kotizo, kiu estas egalvaloro de 25 enlandaj *leterpoŝtmarkoj*, estas necesa por la societo por kunigi la 300 ekuojn, nuna valoro de la *OSIEK-PREMIO*.

Se vi ankoraŭ ne estas membro de *OSIEK*, per favore pripensu, ĉu vi ne volas subteni ĝian agadon por la kultura uzado de esperanto. Nur la membroj de *OSIEK* rajtas

proponi premiindajn titolojn, ĉar ili mem pagas per siaj kotizoj la donotajn premiojn. La membroj de *OSIEK* ĝuas 25 %-an rabaton je la aliĝkotoj de la *IEK* (Internaciaj Esperanto-Konferencoj), elektas la konferencajn temojn kaj la lokojn de la konferencoj. (La venonta *IEK* okazos en Hungario, en Kondoros, inter 17-24a de julio 1993. Se vi deziras, ke la humanisma internaciismo pluvivu en la movado, subtenu per via membriĝo la societon *OSIEK*! Esperantistoj el netranspagaĵovaj landoj kontaktu la sekretarion por trovi manieron de la kotizpago.

#### KONTAKTADRESOJ:

- » Kasisto: Eric Laubacher, 1 rue des Vosges, F-78180 Montigny-le-Bretonneux, Francio, poŝtekkonto 1399 87 R Paris.
- » Sekretario: Patricia Sarica, 50 rue Haute, F-57210 Fèves, Francio.
- » Kulturilatoj: Eugène de Zilah, F-55210 Creuë, Francio.